Roberto Ŝtejgervaldo:

Postmoderno estas nova melodio al malnova teksto

Roberto Ŝtejgervaldo

Postmoderno estas
nova melodio al malnova teksto

Monda Asembleo Socia (MAS)

Roberto Ŝtejgervaldo:
Postmoderno estas nova melodio al malnova teksto
kun antaŭparolo de Hermann Kopp kaj Werner Seppmann
elgermanigita de Vilhelmo Lutermano
Monda Asembleo Socia (MAS)
2013
ISBN 978-2-918300-87-8

Tradukita el la germana originalo:
Robert Steigerwald: Postmoderne ist neue Melodie zu altem Text. En: Hermann Kopp kaj Werner Seppmann (ed.): Gescheiterte Moderne? Zur Ideologiekritik des Postmodernismus [Ĉu fiaskinta moderno? Kontribuaĵoj al la ideologikritiko de la postmodernismo], Neue Impulse Verlag, 2002, ISBN 3-910080-36-7, p. 191-210

Enhavo

Hermann Kopp kaj Werner Seppmann: Antaŭparolo de la eldonintoj.....6
Roberto Ŝtejgervaldo: Postmodernismo estas nova melodio al malnova teksto.....10

Hermann Kopp kaj Werner Seppmann: Antaŭparolo de la eldonintoj

de la kompilaĵo Gescheiterte Moderne? Zur Ideologiekritik des Postmodernismus. Herausgegeben von Hermann Kopp und Werner Seppmann (Ĉu fiaskinta moderno? Kontribuaĵoj al la ideologikritiko de la postmodernismo. Eldonita de Hermann Kopp kaj Werner Seppmann).

Kiam fine de la 1980-aj kaj komence de la 1990-aj jaroj la socialisma tendaro kolapsis, la „postmoderna pensado", kiu en la fruaj okdekaj jaroj sur modfilozofia ondo atingis la felietonojn kaj la seminariojn, estis jam preskaŭ malaperinta. Sed la neatendita „epokrompiĝo" donacis al ĝi triumfan revenon. Tiu okazaĵo ŝajnis ja dramece konfirmi postmodernajn doktrinojn: ke la klerismo nerevokeble fiaskis, ke ĉia espero je historia racio estas vana. La postmodernaj teoremoj trovis novajn adeptojn nelaste inter tiaj homoj, kiuj antaŭe aliĝis al tre lineecaj imagoj de la historia procezo – kaj nun, vide al la amaraj retrobatoj, estis profunde seniluziiĝintaj kaj eĉ kredis sin trompitaj. Ĉar ankaŭ la ĉiutaga praktiko en la riskokapitalismo ne donis multan kialon por optimismaj atendoj de estonteco, oni lasis sin volonte konvinki, ke *„jam ne ekzistas emancipa horizonto"* (Lyotard).

Tio estis des pli facila, ĉar la postmoderna retoriko ja ne neas la civilizaciajn kontraŭdirojn, la socikulturajn paradoksojn kaj patologiojn. Ĝi eĉ kondutas kvazaŭ la kritika konscienco de plene malordiĝinta „moderno". Sed en la postmoderna imagmondo tiuj kontraŭdiroj ricevas aŭreolon de neeviteblo. La homoj en la „postmoderno", laŭ G. Vattimo, devas kontentiĝi per la „elteno"[1], per la „kompreno" de la cirkleco de sia vivo. Ne nur en tiu punkto la pensado en tiu retoriko adaptis la ŝlosilvortojn kaj mondrigardajn kliŝojn de Niĉeo: *„Niĉeo per sia nihilismo principe elartikigis la ideon de superado, ĉar se jam ne ekzistas kialoj nek vero, tiam oni ankaŭ ne povas, elvokante ilin, prediki ion kiel superadon, sed inverse, oni devas familiariĝi kun la ideo de reveno de la samo."* (W. Welsch) Niĉeo devas servi kiel modelo por sinteno, kiu celas elteni la „ekzistadon" en ĝia finiteco – kaj akcepti ĝin, ĉar *„oni ne eskapas al la moderneco ĝuste tie, kie oni travidas ĝin"* (G. Figal) kaj ĉar la kreado de io *„vere nova"* (Vattimo) jam ne povas sukcesi. Spite al ĉia „regadkritika" kaj „subfosa" konduto: la ekzistantaj kondiĉoj estas laŭ la postmodernaj ĉefpensantoj nesupereblaj. Ĉia indiko pri

1 Originale: „*Verwindung*". La nocio (de Hejdegero [orig. *Heidegger*]) signifas *elteno* kaj havas kromsignifan nuancon de *tordiĝo.* -vl

kritikinda aspekto de la socikultura evoluo estas tuj kompensata per intelekta gesto de rezigna adaptiĝo.

Dum la postmoderna retoriko asertas pri si, ke ĝi esprimas la vivpretendojn de la subjekto en malamika medio kaj ke ĝi poziciiĝas por la rajtoj de marĝenaj grupoj, ĝi samtempe turnas la atenton for de la kaŭzoj de kultura fremddeterminado. *„Al la kapitalismo ne ekzistas ĝenerala alternativo”*, emfazas Lyotard, kaj tiel li, same kiel aliaj postmodernistoj, senkulpigas la regantajn kondiĉojn. Tiu legitimiga efiko havas sian fundamenton en la teoriaj aksiomoj de la postmoderna pensado, kiuj – kio estas karakteriza – ne estas sisteme disvolvitaj, sed ricevas sian profilon el la rifuzo de kritika kaj mempripensanta teori-tradicioj. La intelekta batalo direktiĝas kontraŭ pensado orientita al progreso kaj emancipiĝo (unuavice kompreneble kontraŭ la marksismo, kvankam tio ne ĉiam malkaŝe montriĝas) kaj kontraŭ ties metodaj principoj: Anstataŭ demandi pri interrilatoj, kaŭzoj kaj efikoj, la mondo estu laŭ ili konsiderata kiel nekonebla, oni eliru de principa nedistingeblo de vero kaj mensogo. Jam la strebo al objektiva ekkono estas mallaŭdata kiel „totalisma” pretendo. Por la postmodernistoj la socia mondo estas dissplitita en multecon da sistemoj kaj „diskursoj”.

> „Se oni komprenas sub postmoderno la mankon de unueca mondpriskribo, de racio por ĉiuj deviga aŭ ankaŭ nur de komuna sinteno al la mondo kaj al la komunumo, tiam precize tio estas la rezulto de la strukturaj kondiĉoj, al kiuj la moderna socio elmetas sin mem.” (N. Luhmann)

La postmodernismo estas tiel ja konsiderinda reago al la *„erozia krizo”* (O. Negt), kiu minacas la civilizaciajn fundamentojn; sed pro ĝia nekapablo pense trapenetri ĝin, ĝi estas ankaŭ unu el ĝiaj simptomoj. Ĝi estas sponta reflekso, kiu restas ligita al la surfacaj fenomenoj de la „*decentrado*”, de la ajneco kaj seninterligiteco. Per la „*malmuntado*” (do la sistema detruado) de kritikaj formoj de pensado la „postmoderna” ribelprovo restas nur la senforta simbolo de subjektivisma „protesto” kontraŭ la memdetruaj konsekvencoj de la regantaj sociigo-kondiĉoj. La „postmoderna” koncentriĝo al la „*nekontinueco*” kaj la trotaksado de la „*aparto*” kiel ankaŭ la absolutigo de „*percepto*” kaj priskribo kondukas al pensa sinteno, kiu kontentiĝas per la vidata ŝajno. Momentaj bildoj, tempodiagnozaj konstatoj estas ĝeneraligataj kun historimetafizika tendenco. Per tio la postmodernismo deturnas la atenton for de la kaŭzoj de la disŝiriteco de la mondo, imunigas kontraŭ

konsekvenca demandado kaj „fundamentas” la en la ĉiutaga vivo disvastiĝintajn formojn de rezignacio kaj de memsufiĉeco submetita al la sorto. *„Kun la kompreno de la interligiteco”*, skribas Markso en la jaro 1868 al Kugelmann (kaj per tio donas al ni indikon pri la socia funkcio de la postmodernismaj procedoj) *„antaŭ la praktika disfalo falas ĉia teoria kredo pri la konstanta neceso de la ekzistantaj kondiĉoj. Estas do absoluta intereso de la regantaj klasoj eternigi la senpensan konfuziĝon.”*

La intelekta kulturo, kiu nomas sin „postmoderna pensado” aŭ kiu identigeblas kiel tia, montras en la surfaco ja certe buntan kaj multspecan bildon. Enhavaj pozicioj, kiujn kelkaj teoriuloj konsideras elementaj, ne estas akceptataj de la reprezentantoj de aliaj tendencoj (per sia malsama aliro al la temo „postmodernismo” la aŭtoroj de nia kolektaĵo konsideras tion). Kaj certe ekzistas en la postmodernaj diskursoj ankaŭ gravaj indikoj al la social-kulturaj evoluoj de la kontraŭdiroj kaj pripensindaj problemigoj de kutimaj pensŝablonoj (al kiuj apartenas ankaŭ la iluzioj de tradicia pensado pri emancipiĝo, ekz-e la opinio, ke la mondo estas al la homo *senlime* disponebla!) Sed la *„iom pli subtila vido al la aferoj”* (T. Eagleton) tuj pridubiĝas per la radikala rifuzo de ĉiaj pensprincipoj, kiuj povas ja pravigi necesan kritikon de iluziaj ideoj de progresoj aŭ de vivofremda objektivismo. Ankaŭ la bonintenca provo interpreti la postmodernajn paroladojn *„kiel kritikon de la civilizacio de la moderna industrisocio”* (R. Mocek) kaj kiel trairan stadion al kapitalismokritikaj pozicioj certe montriĝos erara. Ĉar la pensŝablonoj de la postmodernismo estas strukturitaj tiel, ke la „malmuntitaj” komprenoj pri kulturo kaj socio nur malofte uzeblas eĉ nur kiel krudmaterialo por komprenebla bildo de la estanteco.

Fine la diferencigo en la detalo ne trompu pri la ekzisto de malmola kerno de premisoj kaj bazaj konvinkoj, kiujn oni devas konsideri kiel unuecigan ligon de la postmodernismo. Praktikan difinon, kiu povas utili kiel unua alproksimiĝo al la postmoderna pensado, donis Sokaj kaj Bricmont en sia libro „Eleganta sensencaĵo. Kiel la pensistoj de la postmoderno misuzas la sciencon”:

> „Temas pri intelekta pensofluo karakterizita de pli aŭ malpli eksplicita rifuzo de la raciisma tradicio de la klerismo, de teoriaj eseoj sen ajna empiria pruvo kaj de kogna kaj kultura relativismo, kiu vidas la sciencon nur kiel «rakonton», kiel «miton» aŭ kiel unu socian konstruaĵon inter

multaj.”

Klerigo pri la postmodernismo kiel koncepto de kontraŭklerigo necesas. Kvankam ĝia influo malkreskis, ĝiaj intelektaj sedimentoj daŭre efikas: La ludo per elementoj de rekta sperto (ekz-e koncerne la dominadon de la „virtuala”, la kompaktecon de la manipuladaj aparatoj aŭ la neceson de „fleksiĝema” psiĥo) respondas al ĉiutagaj spertoj. Tamen de iom da tempo oni ja pli kaj pli aŭdas kritikajn demandojn, la rondo de la homoj pligrandiĝis, kiuj pretas diskuti pri siaj vivkondiĉoj. Ĉar kiom ajn fajnmaŝe la vualo el distordaj mondbildoj, falsaj informoj kaj selektaj realo-perceptoj povas esti teksita: La vivpraktiko ĉiam ree produktas novajn spertojn, kiuj ne sidas senrompe en disvastiĝintaj interpret-ŝablonoj. Estas tiaj spertoj de kontraŭdiroj, kiuj, en favoraj cirkonstancoj, povas instigi al memstara pensado.

Roberto Ŝtejgervaldo: Postmodernismo estas nova melodio al malnova teksto

„La historia movado … turnis sin kontraŭ la fermita verko”[2] – „Ni proponas ion pli bonan, ni proponas unue la justan kaj veran – tio estas jam pli ol la klasika.”[3]

Thomas Mann: Doktor Faustus

Ke klerismo finiĝis en nelibereco kaj ke sekve lasta kaŭzo de tia malbono estas io idea, tion ni „scias” jam de la „Dialektiko de la klerismo” de Horkheimer kaj Adorno. Kaj ĝuste en la momento, en kiu tiuj du enmondigis tiun tezon, Thomas Mann igis Doktoron Trenpiedo – almenaŭ la pli maljunaj inter ni scias, ke Goebbels[4] havis bulpiedon – do la „diablon” en sia „Doktor Faustus” diri: „*La historia movado … turnis sin kontraŭ la fermita verko.”* Ke malkonstruado estas sur la tagordo. Ankaŭ Marcuse[5] dum certaj tempoj sciigis nin, ke superadoj kreas tamen ĉiam nur la samajn aŭ eĉ pli malbonajn malbonaĵojn ol la kontraŭbatalatajn. Kaj ĉu „La malfermita socio kaj ĝiaj malamikoj” de Popper ne estas la „granda rakonto” pri tio, ke tribisme-mitaj formoj de komunuma ideologio (Platono servis al li kiel ekzemplo) aŭ tiuj formoj, kiuj alstrebas raciajn, liberigitajn statojn de la socio (tie li nomis Hegelon kaj en ties sekvo la marksismon) povas finiĝi nur en totalismo kaj ke ni sekve devas forturni nin de tiaj totalaj konceptoj kaj dediĉi nin al „malgrandaj rakontoj”?! Poste ni legis tiajn instruojn en la negativaj utopioj de Orwell, Huxley, Ionesco kaj Huizinga. Alvenis la tiel nomataj Novaj Filozofoj de Francio, iam vortriĉaj ultrarevoluciuloj kaj kritikantoj de la „malsovaĝigitaj” komunistoj, kiuj – post maŭisma interludo – pravigis sian renegatecon per la terorismaj sekvoj de la gvidideoj de „majstraj pensistoj”. Tio estis antaŭ ĉio (sed ne nur)

2 Mann, Thomas: *Doktor Faustus. Das Leben des deutschen Tonsetzers Adrian Lewerkühn erzählt von einem Freunde* [Doktoro Faŭsto. La vivo de la germana komponisto Adrian Leverkun], Berlino, 1947, p. 258.

3 Saml., p. 254.

4 Joseph Goebbels [józef gébels] estis la ministro pri propagando de la hitlera reĝimo dum la faŝisma „Tria Regno” de 1933 ĝis 1945. -vl

5 Herbert Marcuse [hérbert markúze]. -vl

celata kontraŭ la grandrakontisto Markso. Ili vidis lin en la tradicio de Platono kaj de Aristotelo. En la stilo de Niĉeo kaj Hejdegero[6] oni proponas la forlason de tiu okcidenta pensvojo. Kaj – mi rimarkigu tion preterpase – la koncepto de la t.n. „Nigra libro de komunismo" estis jam entenata en la verkoj de la aŭtoroj André Glucksmann, Bernard-Henry Lévy, Michel Guérin, Christian Jambet, Guy Lardreau, Jean-Paul Dollé, Philippe Roger, Jean-Marie Benoist, Françoise Lévy, Philippe Némo.[7] Sed por ke ni ne forgesu la „instruojn" de tiuj grandrakontistoj pri la nevaloro de „grandaj" kaj la utilo de „malgrandaj" rakontoj, la sama baza teksto estas de kelkaj jaroj, kun nova melodio kaj denove venanta el Parizo, surmerkatigata sub la titolo postmoderno. Ne eblas nomi tiun vorton nocio, por tio la enhavoj laŭplaĉe signataj per ĝi estas multe tro malsamaj.

Dum la suprenira epoko de la burĝaro la frapvortoj de la ĉiutaga ideologio venis el la sciencaj klopodoj ĝis la „malaltaĵoj" de la ĉiutageco. Tio ŝanĝiĝis en certaj sociaj kampoj kaj sufiĉe frue: En Germanio oni nomis – kaj daŭre nomas – tiujn, kiuj prenis la produktojn de la gelaboristoj ties „labordonantoj" kaj tiujn, kiuj estis „liberigitaj" je siaj laborproduktoj, „laborprenantoj". Intertempe establiĝis ia ĵargono, ia friponlingvo, kiu parolas pri homrajtoj, kiam ĝi celas nafton, pli ĝenerale: profiton. Aŭ pri packonservaj disponoj, kiam ĝi ne kuraĝas diri agresmilito. Ekde la konturiĝantaj krizprocezoj fariĝis vera modo: ĵurnalismo orientita al amasa publiko inventas frapvortojn, kaj tiuj estas senpere transprenataj en la sciencan laboron. Tio validas ankaŭ pri la frapvorta paro moderno/postmoderno. Ekze Engelmann, unu el la spertaj germanlingvaj varbantoj por tiu koncepto, atentigas pri la fakto, ke jam Lyotard[8] ne povas diri, pri kio ĝi temas. Ĉar demandite, kio postmoderno estas, li respondis: *„Mi ja klopodas por kompreni, kio ĝi estas, sed mi ne scias tion."*[9] Gedö indikas, ke la elementa

6 Germane: *Martin Heidegger* [mártin hájdeger]. -vl

7 Steigerwald, Robert.: *Marxismus und Marxismuskritik heute* [Marksismo kaj marksismokritiko hodiaŭ], Frankfurto ĉe Majno, 1986, p. 42 sj. – Elparolu respektive [andré gliksmán; bernár harí leví; miśél geré; kristiá ĵabé; gí lardró; ĵá pól dolé; filíp roĵé; ĵá marí benŭá; frasŭáz leví; filíp nemó]. -vl

8 Jean-François Lyotard [ĵá frasŭá liotár]. -vl

9 Lyotard, J.-F. k.a.: *Immaterialität und Postmoderne* [Nematerieco kaj postmoderno], Berlino, 1985, p. 74.

signifo, laŭ kiu la postmoderno sekvas al la moderno, ne estas konservata.[10] Lyotard servas al ni la frenezaĵon, ke postmodernismo estas la estiĝostato de la modernismo, verko povas esti moderna nur post kiam ĝi fariĝis postmoderna.[11]

Por bazi la diriton ni ĵetu mallongan rigardon al la historio kaj la aplikmanieroj de la vorto postmoderno. Ĝi aperas por la unua fojo en la jaro 1917 ĉe Pannwitz, en lia verko „La krizo de la eŭropa kulturo"[12] kaj estas tie uzata por karakterizi mankon: Mankas tiu homtipo de superhomo (de Niĉeo), edukita en la spirito de naciismo kaj militismo, de sportismo kaj religieco. Nur ties alveno ĉesigos la krizon de la eŭropa kulturo. Toynbee karakterizis la kulturepokon, kiu komenciĝis ĉirkaŭ 1870, kiel tiun de la tutmonda intervenŝtato, kiu anstataŭas la nacian ŝtaton. Temas do, en la marksisma lingvouzo, pri la komenco de la imperiisma stadio de la kapitalismo. Elirante de tio, Sommervell nomis en la jaro 1947 ĝuste tiun stadion postmoderno. Iom pli poste, por Levin en Usono estas signo de postmoderno, ke la literatura produktado postrestas al tiu de la postmilita generacio. En la jaro 1969 L. A. Fiedler uzas la vorton kun pozitiva valoro por tiu literaturo, kiu liberiĝas el la t.n. klasikaj reguloj kaj normoj kaj uzas la metodojn de la pop-kulturo. Kaj en la arĥitektura teorio ekde la 1970-aj jaroj la vorto estas ankaŭ pozitive uzata por nomi la rompon kun la tradiciaj konstrureguloj kaj por favori arĥitektan eklektismon. Eblas citi ankoraŭ pli da tiaj ekz-oj, sed tiuj ĉi sufiĉu por montri, ke ĝis tiam temas pri terminologia ĉiesulino kaj ne pri scienca nocio.

Tio iom ŝanĝiĝis en la lasta tempo, per tio ke precipe Lyotard kaj Derrida ligis kun tiu vorto certajn ideologiajn-politikajn juĝojn kaj sendis la tutaĵon en la kampon de filozofio.[13]

10 Gedö, A.: *Die Philosophie der Postmoderne im Schatten von Marx* [La filozofio de la postmoderno en la ombro de Markso], en: Buhr, M. (edit.): *Moderne – Nietzsche – Postmoderne*, Berlino, 1990, p. 65.

11 Lyotard, J.-F., en: Engelmann, P. (ed.): *Postmoderne und Dekonstruktion. Texte französischer Philosophen der Gegenwart* [Postmoderno kaj malmuntado. Tekstoj de francaj filozofoj de la nuntempo], Ŝtutgarto, 1990, p. 45.

12 Pannwitz, R.: *Die Krisis der europäischen Kultur* [La krizo de la eŭropa kulturo], Nurenbergo, 1917, vol. 2, p. 64.

13 Vd ankaŭ pri postmoderno: Lothar Peter: Postmoderna maldekstra radikalismo – ĉu vojo al nova estonteco? Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda

Mi okupiĝu nur pri tiu nuna filozofia koncepto de postmoderno, kiun uzas precipe Lyotard.

Por aliĝi al tio, kion li nomas postmoderno, li donas diversajn motivojn. Ekz-e: Ni spertis kontraŭecon de malhomogenaj manieroj diskuti, manieroj scii, formoj vivi.[14] Dua motivo estas por li, laŭ Engelmann, ke ni nuntempe spertas procezojn de diseriĝo, ke la socia subjekto dissolviĝas.[15] Motivo estas por li ankaŭ la repuŝado de la „superdimensiigo de individua vivo" kaj ĝiaj „malbonegaj sekvoj"[16], „egaligo de la aferoj"[17], alvoko al unueco, al identeco, al sekureco,[18] al repacigo de la disigito. En ĝia nomo okazis la atako de la avangardo (de la arto, ĉar ĝi kritikas la tradiciajn regulojn, kaj de la malplimultoj) kaj praviĝis la teroro. Kontraŭ la ekskludado de la diferenco fare de la baza raciismo necesas, laŭ li, lukti per defendo de la individueco kaj de la malhomogeneco.[19]

Sed evidenta ĉefmotivo estas la batalo kontraŭ la „totalismo". Tiu fontas el tio, kion Lyotard nomas „grandaj rakontoj". Laŭ li, el ties interna logiko sekvas, ke ĉiufoje unu el ili regis super la alia, kaj ke pro tio okazis teroro, totalismo, Aŭŝvico. Kontraŭ tio necesas, laŭ li, disvolvi juĝlogikon, kiu ekskludas tion. Necesas, post Aŭsvico, savi la honoron de pensado. Tio signifas, laŭ li, *„opono al la filozofia moderno … en la ekkonteorio, en la scienca teorio, en la etiko, sed ankaŭ en politikaj formoj."* Oni devas *„emfazi la politikan-ideologian kuntekston de la nocio postmoderno."*[20]

Lyotard volas klarigi tion el historia kunteksto. Kerna procezo de la moderno komenciĝanta en la 16-a jarcento (en la kunteksto de la marksisma sociteorio do de la burĝa, de la kapitalisma disvolviĝo) estas la elformiĝo de la individuo. Tiu moderniga procezo estas ĉiam minacata de antaŭmodernaj kontraŭfluoj, kiel li nomas tiun de la totalismo, kaj per kiu li celas precipe

---

Asembleo Socia (MAS), 2013, ISBN 978-2-918300-85-4 (en la librofina listo de libroj eldonitaj de MAS: la n-ro 88. -vl

14 Lyotard, J.-F.: *Der Widerstreit*, Munkeno, 1987.

15 Laŭ Engelmann, l.c., p. 11.

16 Saml., p. 13.

17 Saml., p. 14.

18 Saml., p. 36.

19 Saml., p. 13-16.

20 Saml., p. 7.

faŝismon kaj „stalinismon”.[21]

Li distingas kelkfoje du formojn de „grandaj rakontoj”, tiujn de mita kaj tiujn de nemita tipo (ni memoru: precize tiel procedas Popper en „La malfermita socio kaj ĝiaj malamikoj”). Tio okazas ekz-e en lia „Memorando pri la legitimeco”.[22] Sed la diferenco estas malgrava, ambaŭ estas principe egaligataj – kaj tio en la nomo de kritiko de egaligismo, pri kiu (kiel ni vidos poste), sekvante Niĉeon, estas kulpigata la raciismo: faŝismo kaj socialismo („stalinismo”) estas ambaŭ totalismaj. La soci-ekonomiaj bazoj, la esencaj socipolitikaj orientiĝoj tute ne aperas en la juĝo. Ĝuste pro la „totalismo” estas egale, ĉu unu sistemo estas la sbiro de la kapitalismo, la alia ties decida kontraŭulo.

La postmoderno estas nun komprenata kiel kontraŭmovado kontraŭ ĉiuj ĉi antaŭmodernaj minacoj al la individuo. La vortoj moderno kaj postmoderno servas do kiel rimedoj por dislimigo kaj por lokiĝo. Ĉe tio moderno – kiel antaŭe la same senkolora vorto novtempo[23] – celas la burĝan soci-formacion, pli precize: ĝian spiritecon. Ĝiaj du periodoj, la suprenira kaj la malsuprenira, estas en la postmoderno-koncepto kontraŭe taksataj: la suprenira periodo, tiu de la klerismo kaj de la (kun ĝi kongruaj) humanismaj kaj emancipaj streboj negative, la malsuprenira, malfruburĝa, pozitive.

La kapitalismo estas sociformacio, tutaĵo. Sed tiu tutaĵo entenas profundajn kontraŭdirojn. Postmoderno, per tio ke ĝi ideologie servas al defendo de la tutaĵo kun la nomo kapitalismo, kreas nun siavice strangan internan kontraŭdiron: Laŭ la negativa pritakso de la klerismo, ni legas: Ties promesoj je tutaĵo kondukis en sangajn sakstratojn.[24] Sekve la devizo devas esti: *„Milito al la tutaĵo, ni atestu pri la neprezenteblo, ni aktivigu la diferencojn, ni savu la diferencojn …”*[25]

(En tiu kunteksto eble utilas rigardi la „estetikan” praktikon ekz-e de

21 Lyotard: *Der Widerstreit,* l.c.
22 Kp Engelmann, l.c., tie p. 54 sj kaj 65.
23 Germane: *Neuzeit.* -vl
24 Lyotard, J.-F.: *Du bon usage du postmoderne. Entretien avec Jean-François Lyotard* [Pri la bona uzado de postmoderno. Interparolado kun J.-F. L.], en: *Magazine littéraire* 239 s, p. 256.
25 Lyotard: *Der Widerstreit,* l.c., p. 27 s.

Lyotard. Li aranĝis ekspozicion, „La nemateriuloj”. Ĝi estis „giganta festivalo” de modernaj komunikiloj, al kiu la tien amasiĝintaj vizitantoj estis senorientiĝe elmetitaj, tiel ke ili estis, en la propra senco de la vorto, tute ne kondukataj al sia vera individueco, al sia „diferenco”, sed manipulataj.)

Sed tiu „milito” ne celas la tutaĵon, kiu nomiĝas kapitalismo, sed tiujn teoriojn de emancipiĝo estiĝintajn sur la grundo de la klerisma burĝaro, ĉar ili entenas en si la danĝeron ke ili montras trans la kapitalismon: Ĉiuj superadoj laŭ tio kreis nur denove samajn malbonaĵojn, oni legas ĉe Lyotard. Pro tio, laŭ li, necesas respondi al la promesoj de tutaĵo per diferencigo, pluraligo, malmuntado. Sed se tio celus nur ĉion ajn, tiam ne nur la grandaj emancipaj rakontoj estus malaktualaj, sed ankaŭ la apologiaj! Do, la diserigo de unu tutaĵo – de la emancipa – estas kompletigenda per la kreado de alia tutaĵo: la pluraliga tendenco estas kompletigata de holisma. Kaj tio tiom, ke iuj pensas, ke ekzistas du komplete malsamaj versioj de la postmoderno.[26] Envere ili estas nur la du flankoj de la sama procedo, tiu de la defendo de la kapitalismo. Ĉar laŭ Lyotard ekzistas nur unu ĝenerala: la antagonismo, kaj per tio li celas precipe la eternan antagonismon de kapitalo kaj laboro.[27] La historio finiĝas kun la kapitalismo!

La moderno, t.e. la kapitalismo, komenciĝis kun la tiel nomata origina akumulado. Tiam la rektaj produktantoj estis perforte disigitaj de siaj produktadrimedoj, tiel estiĝis la du bazaj klasoj kiuj stampas la kapitalismon: burĝaro kaj proletaro, kun ilia antagonisma rilato. Sed la tuta socio, de la bazo ĝis en la ideologia-politika superstrukturo, estas trapenetrita de kontraŭdiroj. Tiutempe kontraŭ la feŭdismo kaj ties ideologio estiĝis la grandaj humanismaj ideoj de la supren strebanta burĝaro, la promesoj de libereco, egaleco kaj frateco, ideoj, kiuj poste estis ĉiam denove frustritaj de la kapitalisma realeco. Aldoniĝis procezoj kaj fenomenoj, kiuj aperis kun la ŝanĝegoj per la scienca-teĥnika revolucio, kun la fiasko de la reala socialismo ktp. En tio la stereotipoj de la postmoderno respegulas realajn problemojn kaj atentigas ankaŭ pri la neceso de la pli profunda marksisma analizado de tiaj problemoj.

Sed la respegulado de realaj problemoj ankoraŭ tute ne estas la malkov-

26 Ekz-e Welsch, en: *Unsere postmoderne Moderne* [Nia postmoderna moderno], *Weinheim*, 1987, p. 53.

27 Lyotard: *Der Widerstreit*, l.c., p. 27 s.

ro de iliaj realaj kaŭzoj. Male, funkcio de la postmoderno-stereotipoj estas, ke ili malfaciligas la ekkonon de tiuj pli profundaj kaŭzoj! La profundaj kontraŭdiroj de la burĝaj konceptoj de progreso do servas al la postmoderno al ĝia kritiko de la spiriteco de la unua fazo de la moderno, de la supreniranta. Tio estas eble plej klara en la konfrontado de du famaj vortoj de Hegelo kaj de Niĉeo, en kiuj la unua gloras la supreniran, la klerisman periodon (ankoraŭ preskaŭ ĉe la fino de sia vivo), sed la alia kondamnas ĝin:

> „Tiom longe, kiom la Suno staras ĉe la firmamento kaj la planedoj ĉirkaŭiras ĝin, oni ne vidis tion, ke la homo starigas sin sur la kapon, do sur la penson kaj konstruas la realon laŭ tiu. … Tio estis do majesta sunleviĝo. Ĉiuj pensantaj estaĵoj kunfestis tiun epokon. Nobla sento trairis la mondon, kvazaŭ nur nun okazus la vera repaciĝo de la dieco kun la mondo.”[28]

Kaj Niĉeo: *„Ĉu oni vere komprenis la faman historion, kiu staras ĉe la komenco de la Biblio, – pri la infera angoro de Dio antaŭ la scienco?”*[29] Lyotard aliĝis al Niĉeo: la lasta rezist-linio kontraŭ la damnitaj aspektoj de la moderno estas la nescio.[30]

En la tuta burĝa ideologio oni supozas, ke la moderna socio estiĝis el la klerismo, kaj malrekte tiu ja estas ĝia kaŭzo, sed nur malrekte, ĉar ĝi mem estas esprimo de la disvolviĝanta materiaj-sociaj kondiĉoj de burĝa speco. Oni faris el la kaŭzo de la moderno do ion derivitan, marksisme formulite: la superstrukturon de la kapitalisma bazo. Sekve, tiuj kritikantoj de la moderno, kies klopodo celas defendi la kapitalisman bazon, povas direkti la fajron de sia kritiko al la spiriteco, sed ekskludi la materian kaŭzon, do liveri pseŭdokritikon, apologion. Ne nur tion! Per tio, ke ili devenigas la faŝismon el certa spirita sinteno, el certa pensmaniero kaj faras la samon pri la socialismo, ili ekskludas la realajn sociajn procezojn kaj bazojn de ambaŭ fenomenoj, iliajn kvazaŭ malsamajn vektorojn, kaj per tio fariĝas egala, ĉu la unuaj efikis kiel sbiroj de la granda mono, la aliaj kiel ties kontraŭuloj, ĉar ambaŭfoje ili ja orientiĝas laŭ la granda mono!

---

28 Hegel, Suhrkamp-eldono, vol. 12, p. 529.
29 Nietzsche, F.: Werke (Kröner-eld.), vol. 77, p. 253.
30 Lyotard: *Der Widerstreit*, l.c., p. 16.

Postmoderno estas nun la klubo, en kiun ĉiuj povas eniri, kondiĉe ke ili adiaŭas ĉiajn emancipajn pensojn. Tiel en tiu klubo troviĝas pozitivistoj kaj vivfilozofoj, strukturistoj kaj fenomenologoj. Postmoderno, tio estas la kunmiksejo de kapitalismo-defendaj ideologieroj en kiom eble plej amasefika esprimmaniero – kaj tiuj du elementoj estas la sola vere nova ĉe la tuta koncepto.

Sed nun provu fari el tiom diverĝaj unuopaj konceptoj nocion aŭ teorion. Miaopinie el tio ekzistas nur tio, kion la koncepto mem nomas „rakonto", per kio ĝi celas miton, ion nerealan.

Engelmann eksplicite emfazas la *„politikan-ideologian kuntekston de la postmoderno-nocio"*.[31] Li rekte aliras la kernproblemon: ĝenerale la ideojn kaj strebadojn direktitajn al emancipiĝo, devenajn el la klerismo, kaj la marksismon speciale. Tiuj „grandaj rakontoj" fariĝis, laŭ li, nekredindaj.[32] Speciale la marksismo estas en ĉiuj siaj variaĵoj neuzebla.[33] Li direktas sin kontraŭ *„la dogmema maldekstro"*, kontraŭ la *„kritika teorio, kiel marksismo aŭ novmarksismo, aŭ kiel ajn"*.[34] La ideoj de Hegelo pruviĝis kiel baza ideo de totalisma regado.[35] En la vortoj de Lyotard: La hegela dialektiko povis *„finiĝi nur en la teruro"*.[36] La klerismo komenciĝanta kun Kantio eĉ kondukis al Aŭŝvico, laŭ Lyotard. Pro tio li instigas al *„malfido kontraŭ la grandaj rakontoj"*.[37]

Elirpunkto estas la tezo de Niĉeo, ke la nocie ĝeneraliga racio perfortas la unuopon kaj la aparton. Tion oni ligas (kiel en la historiismo-koncepto de Popper aŭ en la „Negativa dialektiko" de Adorno) kun la stereotipo de totalismo: Ĝeneraligo estigas totaligon. La marksismon oni premas en tiun skemon kaj asertas, ke por savi la unuopon kaj aparton oni bezonas alian specon de racio. Oni postulas ĉe tio:

31 Engelmann, l.c., 1990, p. 7.
32 Saml., p. 11.
33 Saml., p. 10, 12 s.
34 Saml., p. 11, 12.
35 Saml., p. 15.
36 Lyotard, J.-F.: *Memorandum über die Legitimität* [Memorando pri la legitimeco], en: Engelmann, P., l.c., p. 70.
37 Lyotard, J.-F.: *Das postmoderne Wissen. Ein Bericht* [La postmoderna scio. Raporto], Vieno, 1986, p. 63 s.

„Plej grava ĉe tio estas, ne egaligi la nocion de moderno kun la valoroj de la moderno, kiel ekz-e: klerismo, humanismo kaj emancipiĝo.

Nur tiel eblas formi nocion de moderno, kiu permesas senchave paroli pri la nocio de la postmoderno kaj poste kompreni tiun provon realigi la enhavon de la moderno”.[38]

„Estis malnova-nova, revolucie retrobata mondo, en kiu la valoroj ligitaj kun la ideo de la individuo, ni diru do vero, libereco, rajto, racio, estis komplete senfortigitaj kaj misformitaj kaj tamen alprenintaj sencon tute malsaman ol tiu de la lastaj jarcentoj, ĉar ili estis forŝiritaj el la pala teorio kaj sangoplene relativigitaj kaj rilatigitaj al la multe pli alta instanco de perforto, de aŭtoritato, de diktatoreco de la kredo”, diras D-ro Trenpiedo, alie Goebbels, alie la diablo en „Doktor Faustus” de Thomas Mann.[39]

Do, laŭ tio la nocio de moderno estas farenda per disigo de la valoroj humanismo, klerismo, emancipiĝo; nur tiel oni venas al la enhavo de tio, kion la postmoderno komprenas sub moderno. La *„Nobla estu la homo, helpema kaj bona”* de Goeto kaj Ŝilero, ilia: *„Al la vera, bela, bona”* estu forstrekenda el la koncepto de la moderno – kiel la postmodernuloj volas vidi ĝin. Ĉu Adrian Leverkühn – alie Niĉeo – ne diris:

„Mi eltrovis”, diris li, „ĝi ne estu”.

„Kio, Adrian, ne estu?”

„La bono kaj noblo”, li respondis al mi, „kion oni nomas la homeco, kvankam (!) ĝi estas bona kaj nobla. Por kio la homoj batalis, por kio ili sturmis fortikaĵojn, kaj kion la plenumintoj jubile anoncis, tio ne estu. Ĝi estas reprenota.”

„Mi ne bone komprenas vin, kara. Kion vi volas repreni?”

„La «naŭan simfonion», respondis li …”[40]

Sed oni pripensu, ke la lasta frazo de la 9-a simfonio komenciĝas – laŭ

38 Engelmann, 1990, l.c., p. 8.

39 Saml., p. 395.

40 Mann, Th.: Doktor Faustus, l.c., p. 512. – La „Naŭa simfonio” de Bethoveno entenas la faman „himnon al la ĝojo” de Frederiko Ŝilero (kiu fariĝis ankaŭ la himno de la Eŭropa Unio). -vl

la tiutempa teorio kaj praktiko de komponado – per ĥaosa, detrua, en *fortisimo* ekanta „terurfanfaro" (Rikardo Vagnero); kvazaŭ en la tiame ebla postmoderna stilo. Kaj kontraŭ tio Bethoveno kantigas:

„Ho amikoj, ne tiajn sonojn,
sed ni kantu pli agrablajn
Kaj pli ĝojplenajn"

Kaj jen sonas la himno al la ĝojo, al la frateco, kontraŭ tio, *„kion la* (feŭda) *modo severe dividis"* en supran kaj malsupran, al dio, kiu devas esti *„kara patro"*, ne tiu, kiu bezonas servistojn, ĉar li volas havi mastrojn, kiel la dio de Niĉeo.

Forigo de la humanisma kulturo el la klerisma, la progresema fazo de la moderno (t.e. de la burĝa spiriteco) – jen la senco de la manipulado, kiun la postmodernuloj faras por enkonduki sian koncepton de moderno, la koncepton de la dua fazo de la moderno, tiu de la reakciiĝo de burĝa ideologio.

Kaj poste ili klarigas tion, kion ili nomas la enhavo de sia moderno-koncepto: *„Kerno de tiu moderniga procezo estas la liberigo de la individuo … En la moderna eŭropa socio la libera individuo fariĝas la elirpunkto de la ŝanĝiĝantaj ekonomiaj, sociaj kaj ideologiaj strukturoj"*.[41]

Tio estas unue malĝusta en la senco, ke la elformiĝo de la du bazaj tipoj de individuoj, de la burĝo kaj de la proleto, ne estis la kaŭzo de ĉio, ĉar tio estis la tiel nomata origina akumulado. Due necesus paroli pri la kvalite malsama speco de libereco de la du bazaj tipoj. Trie la libera individuo estas tiu, kiu – vidu supre – estis liberigita (!) de la valoroj de la klerismo, kiu do, por uzi vorton de Niĉeo, estas *„sen moralino"* (memoru la komence cititajn vortojn de Pannwitz pri la postmoderna homtipo)! Kaj kio estas tiu individuo libera je ĉiaj valoroj? Ĝi estas – nur maskite – la niĉea superhomo. Al burĝa ordo, kies bazo tiu individuo estas, la postmodernulo diras JES same kiel li diras NE al tiu individuo, kiu laŭ la klasikuloj de filozofio kaj literaturo, devigata al la humanismaj valoroj, devas agi kun respondeco antaŭ la tutaĵo.

Tia postmoderno estas, laŭ ili, tiam *„nova progreso en direkto al pli adaptita formo pensi kaj formi sociecon kun konservado de la bazaj*

41 Engelmann, P., 1990, l.c., p. 8.

valoroj” (sed de kie tiuj subite venas kaj kiuj estas ili?) *„de la eŭropa civilizacio”*.[42] Jen necesus memorigi pri la enhava determinado de tio, kion libereco ĉi tie signifas![43]

Do oni unue kreas la ŝajnon de kontraŭtotalismo – uzante la niĉean logiko-kritikon –, kaj kio rezultas, estas la libereco de la niĉea superhomo, de la prototipo de aŭtoritateca homo ligita al nenia moralo.

Sur tiu bazo oni kreas laŭdire novan tipon de racieco; mi diras *laŭdire* novan, ĉar ankaŭ ĝi jam venas de Niĉeo:

> „La nova klerismo – la malnova estis en la senco de la demokratia grego: egaligo de ĉiuj. La nova volas montri la vojon al la regantaj naturoj; – en kia mezuro al ili (kiel al la ŝtato) estas permesata ĉio, kio ne estas permesata al la gregulo.”[44]

La nova klerigo devas malkonstrui (en la franca, vorto enkondukita de Derrida) interrilatojn, anstataŭigi la racian pravigon per alia speco de pravigo. Temas pri la transiro al arto, sed per tio oni celas la inventadon de mitoj, de rakontoj, laŭ la modelo de Niĉeo kun lia „Zaratuŝtro”. Kaj la malkonstruado siavice ne eblas sen premisi malkonstruendajn interrilatojn kaj regulojn de malkonstruado, kaj per tio tiu laŭdire pluraliga procedo baziĝas sur io ĝenerala!

La „nova” klerigo turnas sin aparte kontraŭ la konceptoj de emancipiĝo, kontraŭ ilia pensmaniero direktita al la ŝanĝenda tutaĵo, turnas sin kontraŭ la „grandaj rakontoj”, kiuj per realigo de abstraktaj modeloj kondukas la socio-econ en la totalismon (tio siavice memorigas Popper-on). Tia racieco estu detruenda, ĉar ĝi finiĝis en Aŭŝvico. Jen la originala tekstero ĉe Lyotard:

> „Al mi ŝajnas efektive malebla pensi tiel plu … fari kvazaŭ ia kleriga koncepto … simple daŭrigeblus. Mi opinias, ke ĉia filozofio, kiu sen-

42 Saml., p. 10 kaj 12.

43 Pri la senco de libereco ĉe la plej eminentaj liberalistoj mem (eŭropaj kaj usonaj) vd Domeniko Losurdo: Libereco kiel privilegio. Kontraŭhistorio de la liberalismo (en la librofina listo de libroj eldonitaj de MAS la n-ro 85) kaj artikolon pri tiu ĉi libro en *Le Monde diplomatique en Esperanto*: Lucien Sève: La liberalismo – ideologio de la mastroj, en http://eo.mondediplo.com/article1946.html
. -vl

44 Nietzsche, F.: Werke (Kröner-eld.), vol. 83, p. 282.

rezerve akceptas la ideon de emancipiĝo, fermas la okulojn antaŭ la plej esenca: antaŭ la malvenko de tiu programo … Temas tute ne pri tio, ke progreso ne okazis, sed male, ke la scienca-teĥnika, arta, ekonomia kaj politika evoluo ebligis la totalajn militojn, la totalismon, la kreskantan malegalecon inter nordo kaj sudo, la senlaborecon kaj la novan malriĉecon, la kulturan malkonstruon kun la krizo de la eduksistemo. Brutale dirite, mi ŝatus diri, ke unu vorto esprimas la finon de la moderna raciidealo, tiu estas: Aŭŝvico."[45]

La vorto estas monstra: Tie estas nomataj ĉiuj bazaj krimoj de la kapitalismo, sed ĝi mem kiel kaŭzo prisilentata, kaj anstataŭ tio la klerismo, la plej bona kontribuaĵo de la burĝaro al la mondkulturo kulpigata kiel kaŭzo de la plej abomeninda krimo. Jen ekzemplo de tiu pseŭdokritiko, de tiu kapitalismo-apologio, pri kiu mi jam supre mallonge parolis. Kaj krome ni havas ĉi tie la koncepton, ke la historio kun la kapitalismo, trans kiu ĝi ne povas nek rajtas iri, alvenis al sia fino.

La postmoderno entenas profundan internan memkontraŭdiron. Ĝi denuncas teorion kiel „grandan rakonton", deklaras ĉiajn grandajn rakontojn relativaj. Sed la postmoderno mem ne povas ekzisti sen serio de grandaj rakontoj:

1-e estas tie la „granda rakonto" pri la ekzisto de grandaj kaj malgrandaj rakontoj, ĉe kio la grandaj estas ne permeseblaj, la malgrandaj permeseblaj. Oni kunigas unue ĉiujn ĉi rakontojn pere de ĉio-operatoro[46], do de logike ĝeneraliga operacio, per kio la baza premiso de la postmoderno-stereotipo estas refutita. Kaj tio tre memorigas pri Popper, kiu en sia socialteĥnologio allasas malgrandajn paŝojn, estas malema al grandaj, sen ke por tiu distingo estus alia kriterio ol la donita sociordo, la kapitalisma. Kaj pri tio li ankoraŭ verkas mem „grandan rakonton" en la senco de sia propra historifilozofio.

2-e estas tie la „granda rakonto", ke ĉiuj emancipaj konceptoj (ree logika ĝeneraligo!) fiaskis.

3-e ni havas la „grandan rakonton", ke la bazaj problemoj de la kapital-

45 Lyotard, J.-F.: *Postmoderne für Kinder. Briefe aus den jahren 1982-1985* [Postmoderno por infanoj. Leteroj el la jaroj 1982-1985], Vieno, 1987, p. 96 s.

46 Alia termino por *ĉio-operatoro* estas *ĉio-eldiro.* -vl

ismo devenas el la klerismo; la reala materia kaŭzo estas forprenata el la paflinio kaj anstataŭ ĝin oni respondecigas ion derivitan, parton de la ideologia superstrukturo de la kapitalismo.

4-e estas tie la „granda rakonto", kiu taksas la supreniran fazon de burĝa spiriteco negative, sed la malsupreniran pozitive.

5-e kaj tute ne laste oni prezentas en „granda rakonto", ke la kapitalismo estas la *„metafiziko de la volo"*, *„la senfino de la volo"* (tio pensigas pri la volfilozofio de Schopenhauer kaj Niĉeo), aŭ refoje Lyotard: *„ke al la kapitalismo ne ekzistas ĝenerala alternativo"*, ke temas pri la *„etendo de kapitalismaj produktadkondiĉoj al landoj, kiuj estas ankoraŭ submetitaj al burokrata kuratoreco"*.[47] La kapitalismo estas la fino de la historio! Kaj ĉu estis malĝusta, kompreni sub la nocio de la burokrata kuratoreco la real-socialismajn ŝtatojn, kiuj estas rekondukendaj en la sinon de la kapitalismo?!

Markso skribis iam al Kugelmann: *„Kun la kompreno de la interligiteco disfalas, antaŭ la praktika disfalo, ĉia teoria kredo je la konstanta neceso de la ekzistantaj kondiĉoj. Estas do absoluta intereso de la regantaj klasoj eternigi la senpensan konfuziĝon."* (Letero al Kugelmann de la 11-a de julio 1868) Kaj precize tiu procedo estas „flegata" ekde la mezo de la pasinta jarcento en la marksismo-kritiko. Mi memorigas pri la elkovita teorio de tri faktoroj de la valoroj, pri la – de Pleĥanov trafe kritikita – dissplito de la materiaj-sociaj faktoroj en memstarajn estaĵojn (por kontraŭbatali la historian materiismon), pri la socikoncepto de Rudolf Steiner, pri la disigo de la manaĝera funkcio disde la propriet-demando, ktp ktp. Kaj ĝuste tiu estas ankaŭ la analiz-metodo de la postmodernuloj: La relative memstaraj kampoj, kiuj labordivide elformiĝas ene de la kapitalisma soci-formacio, estas aliinterpretataj kiel komplete memstaraj fenomemoj. Werner Seppmann dediĉas sin – kiel ankaŭ Heinz Jung antaŭ kelkaj jaroj en la gazeto *„Neues Deutschland"* – en la enkonduko al sia libro „Subjekto kaj sistemo"[48] al la kritiko de tiu procedo. La celo estas forparoli la dominadon de la tutaĵo – de la kapitalismo –, per parolado pri ties kampoj kaj ties respektivaj apartaĵoj, laŭdire por certigi la propran sencon de la unuopaĵo kaj de la apartaĵo. En la

47 Lyotard, J.-F. k.a.: *Immaterialität und Postmoderne*, l.c., p. 66.

48 Seppmann, W.: *Subjekt und System. Zur Kritik des Strukturmarxismus* [Subjekto kaj sistemo. Kontribuaĵo al la kritiko de la strukturmarksismo], Lüneburg, 1993.

realo tia procedo, ĉar ĝenerala mezurilo devas al ĝi manki, kondukas al kompleta relativismo. Tiun la postmoderno povas nur ĉirkaŭiri, per tio ke ĝi – ĉirkaŭvoje – enkondukas holisman procedon, kiu prenas la kapitalismon kiel tutaĵon el la kritiko. Sed ankaŭ tio estas ankoraŭ ligita kun granda cerblavado, per tio ke oni egaligas tiun tutaĵon kun homrajtoj, libereco, demokratio ktp (ĉe tio oni tamen ne forgesu, ke tiuj valoroj de la moderno estis origine ja rifuzitaj de Lyotard!), sen tamen demandi pri la reala situacio de homrajtoj kiaj ekz-e tiu je laboro kaj loĝado en la imperiismaj metropoloj – por tute ne paroli pri la tiel nomata Tria Mondo.

La marksismo, male, eliras el la tutaĵo de la sociformacio, kiu efikas en ĉiuj siaj kampoj determine – ekz-e en la valor- kaj plusvalor-leĝo, en la antagonismo de la bazaj klasoj –, kaj kapablas, per la instrumento de la dialektiko, kompreni la respektivan apartecon de la unuopaj kampoj, ekz-e de la ideologia-politika superstrukturo aŭ de la produktadmaniero mem. Nek nebula holismo taŭgas nek la sinteno de tiu sorĉadlernanto, kiu havas la partojn en la mano kaj scias nenion fari per ili, ĉar mankas al li la spirita ligo.

András Gedö detale pritraktas la historion de la postmoderno-stereotipo.[49] Montriĝas, ke la respektivaj bazaj pozicioj estas delonge ellaboritaj. Jam tre frue en la historio de la burĝa sociordo ekparolis kelkaj de ili surbaze de tiu formacio kaj kun la celo protekti ĝin, kiuj esprimis siajn zorgojn pri la estonteco de burĝaj kondiĉoj. Ili vivis en landoj – aŭ pristudis ties realaĵon –, kiuj jam antaŭ iom da tempo faris sian burĝan transformadon aŭ kies burĝaj kondiĉoj – pro la manko de antaŭa plene elformita feŭda sociordo – estis plurrilate jam pli alte evoluintaj (do en Anglio aŭ en Francio). Tocqueville aŭ Burke ekz-e ja celis defendi la burĝan tipon de libereco,[50] sed ili timis unuflanke, ke la burĝaj streboj al egaleco egaligos la socion, stagnigos ĝin – ĉi tie por la unua fojo aperis la ideo pri la kapitalismo kiel fino de la historio –, kaj aliflanke, ke el la streboj al egaleco povos fonti bezonoj, kies realigo kondukos trans la burĝajn kondiĉojn. Pro tio ili postulis enmeti barojn al la burĝa demokratio. Sed tio ankoraŭ ne estis ligita

49 Gedö, A., l.c.

50 Pri la koncepto de libereco ĉe Tocqueville kaj Burke vd Domeniko Losurdo: Libereco kiel privilegio. Kontraŭhistorio de la liberalismo. (Librofina listo n-ro 85). -vl

kun la ideo de ĝia nuligo.

Tio fariĝis jam motivo por Schopenhauer, kiu volis repreni la jam atingitan konsiderindan nivelon de historiaj kaj sociteoriaj komprenoj de sia epoko kaj interpretis la socion kiel daŭrigon de la animala regno: jen viv-filozofia formo almenaŭ propagandi la finon de la historio, eĉ pli, nuligi historion mem.

Sed kun Niĉeo venis poste la malkaŝe deklarita reakcia ŝanĝo al repreno de la tuta humanisma kulturo. Li ĉiam denove batalas kontraŭ la plebismo de la moderna spirito, kontraŭ la plebo. La laboro ricevas, laŭ li, ĉiam pli la tutan bonan konsciencon al sia flanko.[51] Scienco kaj moralo estas la fortaj armiloj de la laboristoj, de la socialistoj, kaj ĉar la liberala burĝaro – sekve al la klerismo – ankaŭ estas infektita de ili, ambaŭ estas dekadencintaj kaj la liberala burĝaro nekapabla defendi sin kontraŭ la ribelo de la plebo, de la grego, de la sklavoj, de la laboristoj. Sekve, scienco – memoru ke Dio ege timas ĝin! –, filozofio kaj moralo submetendas al kompleta alivalorigo. Necesas *„restarigi la naturon: sen moralino”*.[52] Filozofio, laŭ li, postulas argumentojn, pravigojn, pruvojn, logikon anstataŭ ordonon. La plebo venkos per la dialektiko. *„… la subprematoj havas sian kruelecon en la malvarmaj tranĉilo-pikoj de silogismo”*. Sed: *„Por kio tiu elmontro de kialoj? Por kio envere pruvi?”*[53] Logiko estas laŭ li la konscio de la grego, kiu volas ĉion egaligi, kiu perfortas la individuon. La grego volas batali per argumentoj anstataŭ per sentoj.[54] Sed la mondo estas eterna estiĝo, nenio firma. Sekve ankaŭ ekzistas nenio konstatebla, nenia vero. *„Ekkono en si mem en fariĝo malebla.”*[55] Ekzistas nenio, estas nenio, nek subjekto nek objekto. Naturleĝo estas vorto de superstiĉo.[56] La komprenanta spirito enmondiĝis unue kun Sokrato, kiu estas momento de la plej profunda perversiĝo de la historio de la homaro.[57] Necesas nova klerismo:

„«Nenio estas vera, ĉio estas permesata», Zaratuŝtro: Mi prenis de vi

51 Nietzsche, F.: Werke (Kröner-eld.), vol. 78, p. 217.
52 Saml., p. 275.
53 Saml., p. 299.
54 Saml., p. 300.
55 Saml., p. 419.
56 Saml., vol. 72, parto II, p. 16.
57 Saml., vol 78, p. 298.

ĉion, la dion, la devon, nun vi devas doni la plej grandan pruvon de nobla faro: Ĉar ĉi tie la vojo de la senskrupululoj estas malfermita …"[58]

En la lokon de la malnova scienco necesas meti *„gajan sciencon"*. Nia agado estas envere nur ludo, nia spiriteco nur speco de estetika aktiveco. Pro tio la arto estas la ĝusta formo de spiriteco, kio tamen signifas produktado de mitoj. La enhavoj de niaj konscioj estas ne objektivaj ekkonoj, sed metaforoj, fikcioj, antropomorfismoj, do: rakontoj, nenio vera: *„Nenio estas vera, ĉio estas permesata."*[59]

Ĉe Niĉeo la ideo de la fino de la historio ligiĝas do kun tiu de la repreno de tiu emancipa kulturo, kiu endanĝerigas la daŭrigon de tiu speco de homa kunvivado, kiun Niĉeo konsideris sole taŭga, la kunvivado surbaze de mastroj kaj servistoj – ĉe lia epigono Spengler de rabo- kaj de predo-bestoj. Pri la mito ĉe tio distingendas inter tiu de la frua historio, kiu estis ekkonmodelo, ellaborita en epoko kiam la novtempa racia ekkonformo ankoraŭ ne estis naskita. Sed la malfruburĝa mito esta malmuntado de ekkono.

La ĉi tie malfermita pensvojo de malfruburĝa ideologio trovis sian daŭrigon en Spengler, ĉe Hejdegero – apud Niĉeo esenca fonto de Lyotard – en la rekonduko de ĉia esto al la ne pridemandebla ebeno de la lingvo, en la „Dialektiko de la klerismo" de Horkheimer/Adorno same kiel en la „Negativa dialektiko" de Adorno, en kiu ja ankaŭ la ĝeneraliga logiko fariĝis vehiklo de la totalismo kaj anstataŭigebla per muzik-komponado.

Mi provu resumi.

1. Novtempo kaj moderno estas senenhavaj vortoj. Ili signas la kapitalismon, en nia kunteksto speciale la en ĝi disvolvitajn burĝajn ideologiajn-politikajn pensfluojn.

2. Por ideologie defendi la kapitalismon oni ellaboris sistemon de procedoj. En la postmoderno-stereotipo la sola novo estas, ke ĝi kunigas ĉiujn ĉi procedojn kaj kiom eble plej kompreneble disvastigas ilin.

3. La tutaĵo de la kapitalismo estas diserigita en memstarajn estaĵojn,

58 Nietzsche, F.: Lepciga eld., vol. XII, p. 306 s.
59 Nietzsche, F.: (Kröner-eld.), vol. 75, p. 303; vol. 76, p. 398; vol. 83, p. 437.

por tiel eskapi al la danĝero de totalismo, kiu laŭdire eliras el la ĝeneraligo. Tio inkludas la principan kritikon de logiko kaj dialektiko, postulas la transiron al paralogismoj kaj al modernaj mitoj.

4. El la izolitaj kampoj de la kapitalismo oni elektas kritikindajn, oni kritikas ilin, sed tiel, ke la kaŭzo de la kritikato troviĝas en certa – klerisma – spiriteco kaj ke la kapitalismo estas ekster la kritiko. La marksismo estas enmetita en tiujn eraran formon de spiriteco kaj tiel kondamnata.

5. Male al tio, la spiriteco de la malsuprenira periodo de la burĝa sociordo estas ligita kun la apologiaj intencoj.

6. Ĉiuj realaj diferencoj estas malkonstruataj en la nomo de la defendo de la diferenco, tiel ke ĉe la fino restas jam nur „tekstoj" kaj ke jam ne estas diferenco, ĉu tiuj apartenas al la beletra, la scienca aŭ la filozofia literaturo. En la nomo de la batalo kontraŭ la egaligo oni plej radikale meĥanike egaligas. Temas pri la metodo, jam ne vidi la arbaron pro la multaj arboj. Sed laŭ la vera tasko, tiu defendi la kapitalismon, oni poste en holisma kontraŭmovo restarigas la tutaĵon de la kapitalismo kaj deklaras ĝin fino de la historio.

Tiu malfruburĝa mito de postmoderno ĝuas amasefikan subtenon, ekz-e de radio-kolegio, kiu servas al disvastigo de la mito kaj – kompreneble – komenciĝis per la mitaroj de Niĉeo kaj de Vagnero, kaj ĉe tio traktis ilin kiel senkulpajn spirit-formojn.

Gravaj tendencoj kontraŭ tiu moderna malraciismo disvolviĝas en la ekstereŭropa spaco en certa revivigo de la materiismo – ekz-e ĉe Mario Bunge – aŭ en la novaj natursciencaj teorioj kaj hipotezoj, kiuj indikas dialektikajn konsekvencojn. La eble plej grava kontraŭtendenco al la postmoderna kontraŭraciismo, surbaze de burĝa spiriteco en nia lando, estas defendata de Jürgen Habermas. Ĝi estas enmetita en tutaĵan koncepton de klopodado pri humana socio surbaze de komunika racio, de ellaborado de kompreneblaj reguloj por la elbatalado de kontraŭdiroj. Tio estas ja parenca kun la opinio de Popper, al kiu Helmut Spinner, disĉiplo de Popper ribelanta kontraŭ sia „instruisto", kritike objetis: Ĉi tie la socio estas konfuzata kun naturscienca respubliko de kleruloj. Dum en la lasta la opinidisputo ne estas ligita kun klasoj kaj ties kontraŭdiroj, oni devas koncerne la socion konside-

ri, ke ĉi tie en la ludon venas interesoj, kiuj ne ekzistas tiaj en la respubliko de kleruloj.

Ankaŭ la bazaj problemoj de nia epoko malfone denuncataj de postmodernuloj lastanalize fontas el la ekspluatado de la laboro kaj el la raba ekspluatado de la naturo, kiuj ambaŭ ŝuldiĝas al la profitprincipo. Tiu trapenetras la tutan socion kaj ĉiujn ĝiajn partajn kampojn. La fakta ekskludo de tiu materia bazo ĉe Habermas ja ne igas lian kritikon superflua, sed ĝi forprenas al ĝia strategio la puŝforton. Ne ekzistas komunika racio senigita de la materiaj-sociaj bazoj. La racio de ekspluatado kaj tiu de la batalo kontraŭ ĝi ne estas komunike pacigeblaj. Tie decidas la batalo de la klasoj, kio precize studeblas ĉe la socialaj bataloj eĉ nur en Germanio. La „komunika" racio, kiu nuntempe regas mondvaste, estas tiu de la kapitalisma mondmerkato. Ĝi intertempe prisorĉis eĉ kapojn, kiuj antaŭ nelonge ankoraŭ sciis tion pli bone.

Mi scias, ke mia ĝenerala kritiko de la postmoderna filozofio, tia kia ĝi estas defendata precipe de Lyotard kaj de liaj adeptoj, ankaŭ inter marksisme orientitaj homoj ne estas nur dividita. De ili venas ekz-e objĵetoj de jena speco: En la superado de la eliteco ja troviĝas demokratia elemento. La defendo de la diferenco havas la efikon helpi al la malplimultoj akiri siajn rajtojn kontraŭ la plimultaj tendencoj. La batalo kontraŭ la tutaĵo kondukis ankaŭ al tio, ke ĝi prilumis ion kaŝitan en la devigo de la ĝeneralo.

Aŭ ĉar en postmodernaj skribaĵoj oni nomis kritikendajn kondiĉojn de la kapitalisma socio, iuj ne vidas la esencon de la koncepto, kiu tenas la kapitalismon mem ekster la kritiko kaj, uzante la metodon „Haltigu la ŝteliston!" celas la humanismon.

La problemo ekzistas ja ankaŭ kun Niĉeo, pro kio iuj maldekstruloj lasas sin trompi de li! Ĉu la profunda Niĉeo-kritiko de Thomas Mann ne donas al ni instruan ekzemplon de kiel – ja impresita de iu aŭ alia penso, de tiu aŭ jena formulaĵo, de tiu aŭ alia akravida observo ekz-e de la burĝa filistro en la niĉea verkaro – oni tamen scias pri la baza kontraŭhumanisma naturo de ĝuste tiu verko, de ĝia forto aligi al ĉio dekadenca kaj reakcia, eĉ al la poste elformiĝanta faŝismo kaj oni tion faru la baza normo de sia sinteno al Niĉeo?

Ankaŭ ni kritikantoj de la postmoderno-mitaro scias, ke efektive ekzist-

as problemoj kun la koncepto de la tuteco, de la ĝeneralo, de la totaleco. Ĝustas, ke sub la nocioj de ĝeneralo troviĝas meĥanikaj kaj organikaj tutaĵoj, kaj ke la rolo de la tutaĵo, aparto kaj unuopo en ĉiu el tiuj du konceptoj estas komplete malsama. En la meĥanika tutaĵo la unuopo ekzistanta komplete kaj sole por si mem estas samtempe submetita al la egaliga devigo de la tutaĵo, prirabita je sia propraj karakterizaj trajtoj. En la organika tutaĵo – laŭ nova prezento de la problemo fare de Renate Wahsner,[60] kiu ĉe tio eliris de Fojerbaĥo kaj Ĉieskovsko – ekzistas inter la mezaj elementoj de la tutaĵo rilato de „esti-reciproke-unu-por-la-alia". Oni povus ekz-e nomi la kapitalisman sociformacion tiusence organika tutaĵo, en la senco ke ĝi ne povas ekzisti sen la kontraŭeco kaj reciproka unu-por-la-alia-esto de la du antagonismaj bazaj klasoj. En organikaj tutaĵoj ekzistas multspecaj formoj de interrilato. Tiu problemo tamen ne diskuteblas ĉi-loke, ĉar por tio oni devus pritrakti ankaŭ teoriajn kaj praktikajn aspektojn de la pereinta provo de socialismo en orienta Eŭropo!

Tiel, miaopinie, kelkaj marksisme orientitaj esploristoj ne sufiĉe konsideras la tutan interrilaton. Pro la nekontestataj mankoj de la marksisma esplorado (ne nur de esplorado!) en la lasta pasinteco kaj pro la neceso „malkonstrui" la mankojn en la maniero aliri tiujn problemojn – ni tamen ne tendencu al la opinio, ke oni devas forĵeti ne nur la mankojn de la laboro per la marksisma analiz-instrumento, sed ankaŭ tiun mem, ĝiajn bazajn elementojn, kaj poste el tiu pozicio disvolvi „komprenon" por la postmoderno! Taŭgas demandi, ĉu ni ne lernis la lecionon, kiu ekzistis – por nomi kompareblan problemon – ekzemple pri kiel pritrakti Niĉeon kaj kiel tiu leciono estis ja ekzemplodone prezentita en la diskuto inter Lukaĉo kaj Bloch pri tiu demando. Ankaŭ taŭgas la demando, kun kiu ni tie alianciĝus – kaj kontraŭ kiu: kun Lyotard kontraŭ Habermas aŭ kun tiu kontraŭ Lyotard, por jen nomi la problemon.

60 Wahsner, R.: *Probleme mit der Kategorie des Allgemeinen* [Problemoj pri la kategorio de la ĝeneralo]. Represaĵo 107 de la Instituto Max Planck pri sciench-historio, Berlino, 1998.

La **Monda Asembleo Socia (MAS)** …

… estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto *Le Monde diplomatique en Esperanto* (*http://eo.mondediplo. com)* – reta, laŭokaze ankaŭ papera – volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retpoŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro *„Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj …"*. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: *http://mas-eo.org* enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen en la vico de ilia apero:

1. – C. F. Ramuz: Aline (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-0-2

2. – Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-2-6

3. – Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 59 p., ISBN 978-2-9529537-1-9

4. – Kubaj infanrakontoj, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, MAS, 2007, 120 p., ISBN 978-2-9529537-4-0

5. – GBEGLO Koffi: Esperantujismo, MAS, 2008, 72 p., ISBN 978-2-9529537-5-7

6. – Johano Besada: Eseoj, MAS, 2008, 92 p., ISBN 978-2-9529537-3-3

7. – [Karlo Markso] Markso hodiaŭ -- Nerefuteblaj citaĵoj, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2008, p. 91 p., ISBN 978-2-9529537-8-8

8. – Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj (2 paroladoj), elhispanigita de Amparado Cisnero, MAS, 2009, 84 p., ISBN 978-2-9529537-7-1

9. – Dominique Vidal kun Sébastien Boussois: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949, elfrancigis Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 361 p., ISBN 978-2-9529537-6-4

10. – Unuiĝintaj Nacioj: Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Poitikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj – trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 230 p., ISBN 978-2-9529537-9-5

11. – Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7

12. – Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 52 p., ISBN 978-2-918300-02-1

13. – Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-03-8 (2-a eld.: 978-2-918300-21-2)

14. – Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo, MAS, 2009, 103 p., ISBN 978-2-918300-05-2

15. – Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 112 p., ISBN 978-2-918300-04-5

16. – Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj. François Jullien: Ĉinscienco en sakstrato – Ĉinio en la spegulo de Okcidento; Manfred Szameitat: Sukcesa, sed ne socialisma; Ingo Nentwig: Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; Barry Sautman: Protestoj kaj separismo en Tibeto; Michael Parenti: La mito de Tibeto; Enfu Cheng: Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkatekonomio; Jian Xinhua: Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; Theodor Bergmann: La socialisma disvolvo-strategio de la PR Ĉinio; Rolf Berthold: Pri la interna kaj ekstera politiko de la KP de Ĉinio; Li Bingyan: Ĉinio sub influo de la novliberalismo; Helmut Peters: Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform- kaj malferm-politiko; Jean-Louis Rocca: Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9

17. – Karlo Markso: La mizero de la filozofio, respondo al J. B. Prudono: „La filozofio de la mizero"; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono**. Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 196 p., ISBN 978-2-918300-08-3

18. – Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1, Jörg Goldberg: La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo – pli da demandoj ol respondoj, Horst Hensel: La nomoj de la mono – kontribuaĵo al karakterizo de la nuna kapitalismo, Harald Werner: Notoj pri la psiĥologio de la krizo, Sarah Wagenknecht: Brulfaristoj kiel fajrobrigado – Kritiko de la krizmastrumado, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0

19. – Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo, **Howard Zinn**: La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, **Noam Chomsky**: Kubo kaj Usono – preskaŭ duonjarcento da teroro, **William Blum**: La nepardonebla revolucio, **Michael Parenti**: Agreso kaj propagando kontraŭ Kubo, **Piero Glejeses**: Kubo, Afriko kaj la kvin kubanoj, **Ignacio Ramonet**: Miamo, nesto de teroristoj, **Salim Lamrani**: La Kuba-Usona Nacia Fondaĵo (KUNF) kaj la internacia terorismo, **Leonard Weinglass** : La proceso kontraŭ la Kuba Kvinopo, **Wayne Smith**: Trista paĝo en la historio de usona juro, **Saul Landau**: Kvin kubanoj en malliberejo: viktimoj de la obsedo de Bush, **Michael S. Smith**: Raporto pri du procesoj, **James Petras**: La Kvin Kubanoj – kandidatoj por la Nobel-premio, **Jitendra Sharma**: Veraj batalantoj kontraŭ terorismo, **Ricardo Alarcón de Quesada**: La kazo de la Kvin –pruvo de la terorismo de Usono kontraŭ Kubo, **Gianni Miná**: Historio kiun la amaskomunikiloj kaŝas – la kvin kubanoj, N**adine Gordimer**: La homaro kiel reflekto de la justeco, tradukoj de div. MAS-anoj, MAS, 2009 tradukoj de div. MAS-anoj, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

20. – Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo. Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolando-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, MAS, 2009, 91 p., ISBN 978-2-918300-11-3

21. – Oktobra Revolucio kaj la sekvoj. Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovetsocio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6

22. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2, **Joachim Bischoff: La financkrizo kaj alternativoj, Andreas Fisahn: Demokratia stirado de la ekonomio, Manfred Sohn: Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero, Luciano C. Martorano: Socialismo, sociigo, demokratio, Manfred Lauermann: La dialektika plan-ekonomio de Ĉinio – respondo al la financkrizo**, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0

23. – La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj. Lucien Sève: Ĉu la homo? – La marksa antropologio kaj ĝiaj bazaj konceptoj, Werner Seppmann: Mond- kaj hom-bildoj – Pri la formoj de ideologiaj potenc-reproduktado, Helga E. Hörz: Ĉu la hombildo krizas? Hans-Peter Brenner: Biopsiĥosocia unuo homo – kogna cerbesplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, ISBN 978-2-918300-15-1

24. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, *Ĉapitroj unua ĝis naŭa*, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7

25. Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-17-5

26. – Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-16-8

27. – Arnold Petersen: Komentoj al la „Komunista Manifesto”, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-19-9

28. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3 (2010), Werner Seppmann: Riskokapitalismo;, Richard Sorg: Domenico Losurdo interpretas Niĉeon;, Christina Kaindl: Subjektiveco en la krizo; Harald Werner: La krizo en la ordinara konscio; Christoph Butterwegge: Mondekonomiakrizo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-22-9

29. – Werner Seppman: Laboro kaj dialektiko – Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado; Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso” ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kölsch: Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭece; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo? Eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-18-2

30. – Adjévi ADJE: El togolanda saĝosako, MAS, 2010, ISBN 9782-918300-20-5

31. – Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0 (nur rete)

32. – Ivan Efremov: La nebulozo de Andromedo, Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 403 p., ISBN 978-2-918300-24-3

33. – Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7

34. – Maritza Gutiérrez: José Martí – de kie kreskas la palmo, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-28-1

35. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, *Ĉapitroj deka ĝis dektria*, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 243 p., ISBN 978-2-918300-14-4

36. – Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseoj kaj raportoj, Alexis Passadakis kaj Hendrik Sander: Konkurenco en la forcejo Klimatpolitikaj perspektivoj post la fiasko de Kopenhago; Hans-Jörg Schimmel: La ideologia dimensio de la CO_2-diskuto; Karl Hermann Tjaden: Kapitalmoviĝo kaj klimata okaziĝo; raportoj, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN

37. – Georgo Pleĥanov: Pri rolo de la persono en la historio, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 59 p., ISBN 978-2-918300-36-6.

38. – Karlo Markso: Pri la juda demando, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-29-8

39. – Eddy Raats: Post la pluvo, pluvego, Travivaĵoj de junulo, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-34-2

40. – Adebayo AFOLARANMI: Ronke, la ĵaluzulino, MAS, 2010, 85 p., ISBN 978-2-918300-35-9

41. – Jozefo Ŝlejfŝtejno: Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 271 p., ISBN 978-2-918300-27-4

42. – Ivan Efremov: La Horo de Bovo. Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 573 p., ISBN 978-2-918300-37-3

43. – Roger Martelli: La komunismo estas bona partio – diru al ĝi JES, elfrancigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p. ISBN 978-2-918300-36-6

44. – Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 36 p., ISBN 978-2-918300-38-0

45. – Miriam Rodrígues; ALVERA: Desegni la parkon, elhispanigis Jozefo de Jesús Campos Pacheco (porinfana pentrolibro), 28 p., ISBN 978-2-918300-23-6

46. – Kien Afriko en la 21-a jarcento? *Le Monde diplomatique en Esperanto*, MAS, 2010, 157 p., ISBN 978-2-918300-39-7

47. – Paŭlo Popo: Ĉu sekso subfosas? Maldekstraj teorioj de seksa liberiĝo kaj de malkonstruo de seksa identeco. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p., ISBN 978-2-918300-41-0

48. – Ŝtejgervaldo, Roberto: Komunistaj star- kaj disput-punktoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 151 p., ISBN 978-2-918300-40-3

49. - **Jürgen Albohn: Teorio sen revolucia praktiko estas opio por la popolo – Kritiko de la *Wertkritik***. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 27 p., ISBN 978-2-918300-42-7

50. – V. I. Lenin: Ŝtato kaj revolucio. La instruo de la marksismo pri la ŝtato kaj taskoj de la proletaro en revolucio. Tradukis el la rusa G. Demidjuk, redaktis Jurij Finkel, MAS, 2011, 181 p., ISBN 978-2-918300-43-4

51. – Unuiĝintaj Nacioj: Internacia Konvencio pri la protekto de la rajtoj de ĉiuj migraj laboristoj kaj de iliaj familianoj. Tradukita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-44-1

52. – Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo, komp. Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 289 p., ISBN 978-2-918300-45-8

53. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, *Ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina*, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 359 p., ISBN 978-2-918300-30-4

54. Gvidlibreto por kompreni la internaciajn migradojn, tradukita de Jeanne Marie Cash, desegnaĵoj de la tradukinto, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 15 p., ISBN 978-2-918300-47-2

55. Miriam Rodríguez: Profiloj de Suno kaj Luno, elhispanigita de Jozefo de Jesús Campos Pacheco, kun desegnaĵoj de Danny Daniel Perera Gutiérrez, MAS, 2011, 30 p., ISBN 978-2-918300-46-5

56. Frederiko Engelso: Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300.48-9

57. Georgo Dimitrofo: Raporto al la 7-a Kongreso de la Komunista Internacio; Harald Neubert: La Kominterno en la 1930-aj jaroj kaj la koncepto de unueco; kun enkonduko de Günther Judick, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 113 p., ISBN 978-2-918300-49-6

58. José María Arguedas: Yawar-festo (Sangofesto), Esperantigita de Franklin Montenegro, MAS, 2011, 256 p., ISBN 978-2-918300-51-9

59. Ekonomia krizo n-ro 4. Joachim Becker: EU – de la ekonomia al la integriĝa krizo. Jörg Goldberg: La mondo de la du rapidoj. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-52-6

60. Frederiko Engelso en aktualaj diskutoj. Werner Seppmann: Privilegia loko por rigardi en la laborejon de la marksisma pensado. Notoj pri la korespondado inter Markso kaj Engelso; Erwin Marquit: Engelso kaj logikaj kontraŭdiroj; Karl Hermann Tjaden: Kial ne estiĝis vera engelsismo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 p., ISBN 978-2-918300-50-2

61. V. I. Lenino: Tri fontoj kaj tri partoj de la marksismo; Anarĥiismo kaj socialismo; Pri la slogano de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo; La oportunismo kaj la kolapso de la 2-a internacio; La diferencoj en la eŭropa laborista movado; Antaŭparolo al la broŝuro de N. Buĥarin: „Mondekonomio kaj imperiismo"; elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 40 p., ISBN 978-2-918300-53-3

62. Daŭrigo de la Manifesto, Moderna poziciiĝo de komunista partio, La programo de la Germana Komunista Partio DKP, kun antaŭparolo de Helmut Dunkhase, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 63 p., ISBN 978-2-918300-54-0

63. Lode Van de Velde: Epizodoj, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-55-7

64. Jasuo HORI: Tertrema katastrofo de Japanio. Taglibro, MAS kaj SAT, 2011, 165 p., ISBN 978-2-918300-56-4

65. Werner Seppmann: La malkonfesata klaso.. Pri la laborista klaso hodiaŭ, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 176 p., ISBN 978-2-918300-57-1

66. Roberto Ŝtejgervaldo: Sen laborista klaso okazas nenio esenca, sed sole kun ĝi – ankaŭ ne; Werner Seppmann: Remalkovro de la klasoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 paĝoj, ISBN 978-2-918300-58-8

67. Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-60-1

68. Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-59-5

69. Kien la klimato? N-ro 2, MAS, 2011, 61 p., ISBN 978-2-918300-61-8

70. Berto Breĥto: Historioj pri S-ro Kojno, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 43 p., ISBN 978-2-918300-62-5 (ekskluzive kiel materialo por seminario ĉe MAS)

71. Ivan Efremov: Rakontoj pri neordinaraĵoj, tradukitaj el la rusa de Jurij Finkel, MAS, 2011, 604 p., ISBN 978-2-918300-63-2

72. Alfredo Bauer: Kritika historio de la judoj, vol. 1, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 459 p, ISBN 978-2-918300-64-9

73. Karlo Markso: Respondo al V. I. Sasuliĉ, kun Klaus Gietingter: La miskompreno, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 59 p., ISBN 978-2-918300-71-7

74. Frederiko Engelso: La evoluo de la socialismo de utopio al scienco, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 65 p., ISBN 978-2-918300-65-6

75. Georgo Fulberto: „La kapitalo" koncize. Kun recenzo de Lucas Zeise. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 98 p., ISBN 978-2-918300-72-4

76. Ivan Efremov: Tais el Ateno. El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2012, 533 p., ISBN 978-2-918300-73-1

77. Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, en: Vilhelmo Lutermano: Materialo por la seminario de MAS: „Berto Breĥto kaj klasa moralo en liaj verkoj «Historioj pri S-ro Kojno» kaj «Me-ti, libro de turnoj», Parto 2-a: «Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj»", MAS, 2012, 147 p., ISBN 978-2-918300-74-8

78. Eddy Raats: Pasio, defio, amikeco. Spertoj de montgrimpisto. MAS, 2012, 95 p., ISBN 978-2-918300-70-0

79. Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo. 2-a eld., MAS, 2012, 99 p., ISBN 978-2-918300-76-2

80. V. I. Lenin: Imperiismo, kiel la plej alta stadio de kapitalismo. (populara eseo) El la rusa tradukis Jurij Finkel. Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 125 p., ISBN 978-2-918300-77-9

81. Yoandry Martínez Rodríguez: Tri en la montaro. Tri infanteatraĵoj kun desegnaĵoj de Adrián Armas González. Elhispanigita de Jozefo de J. Campos Pacheco, MAS, 2012, 54 p., ISBN 978-2-918300-79-3

82. Kien la klimato? N-ro 3 (2012) Pri la roloj de kresko kaj de merkato en la tasko protekti la klimaton, Kvin eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 62 p., ISBN 978-2-918300-80-9

83. Rolfo Lotero: Ĉu evolucio aŭ kreado? Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 22 paĝoj, ISBN 978-2-918300-81-6

84. Hans' Magno Encensbergo: Defendo de la lupoj kontraŭ la ŝafidoj. Poemoj. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 118 p., ISBN 978-2-918300-75-5

85. Domeniko Losurdo: Libereco kiel privilegio. Kontraŭhistorio de la liberalismo. Esperantigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 379 p., ISBN 978-2-918300-82-3

86. Franco Kafko: Letero al la patro. Kun akompanaj tekstoj kaj postparolo de Michael Müller. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano. MAS, 2012, 81 p., ISBN 978-2-918300-83-0

87. Aleksandro Grin: Skarlataj veloj. La ora ĉeno. Kuranta sur ondoj. Mallongaj rakontoj. El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2013, 418 p., ISBN 978-2-918300-84-7

88. Lothar Peter: Postmoderna maldekstra radikalismo – ĉu vojo al nova estonteco? Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 25 p., ISBN 978-2-918300-85-4

89. Ontologio kaj fremdiĝo nuntempe. Domeniko Losurdo: Hegelo, Markso kaj la Ontologio de la socia esto; Claudius Vellay: Fremdiĝo el la vidpunkto de la ontologio de Lukaĉo. Materiisma etiko ĉi-flanke de religio kaj kredo. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 61 p., ISBN 978-2-918300-86-1

90. Roberto Ŝtejgervaldo: Postmoderno estas nova melodio al malnova teksto. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 28 p., ISBN 978-2-918300-87-8 (tiu ĉi libreto)

91. Heinz Dieterich: Transiroj al la socialismo en la 21-a jarcento, elgermanigita de

Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 22 p., ISBN 978-2-918300-88-5

92. Frederiko Engelso: Enkonduko al Karlo Markso: Klasbataloj en Francio 1848 ĝis 1850 (1895), elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 23 p., ISBN 978-2-918300-89-2

93. Máté Zalka: Doberdo. Romano tradukita el la hungara de János Petik, MAS, 2013, 317 p., ISBN 978-2-918300-90-8

94. Jean-Guy Allard: Teroristoj de Usono kontraŭ Latinameriko. Artikoloj tradukitaj de Norberto Díaz Guevara kaj de ceteraj MAS-anoj, MAS, 2013, 445 p., ISBN 978-2-918300-78-6

Roberto Ŝtejgervaldo:
Postmoderno estas nova melodio al malnova teksto
kun antaŭparolo de Hermann Kopp kaj Werner Seppmann
elgermanigita de Vilhelmo Lutermano
Monda Asembleo Socia (MAS)
2013
ISBN 978-2-918300-87-8